

Duonjarcento de Sennacieca Asocio Tutmonda, 3-a parto
Claude Gacond, 406-a radioprelego, 1971.07.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron Sennacieca Asocio Tutmonda festos sian duonjarcenton de ekzistado. Ni partoprenas tiun jubileadon dediĉante kelkajn radio-elsendojn al la priskribo de la ĉefaj etapoj de la historio de SAT.

A.- Eŭgeno Lanti, kiel Ludoviko Zamenhof kaj Hector Hodler, estas pensulo, kiu kapablis enkorpiigi sian penson en socian estaĵon. Kaj tiu socia estaĵo daŭre vivas. Ĝi estas Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu naskiĝis en 1921 okaze de la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago.

Cl.- Kiu estas tiu Lanti, kies penson daŭre reprezentas la nuna SAT ?

A.- Eŭgeno Adam, tio estas lia vera nomo, naskiĝis en normanda vilaĝo la 19-an de julio 1879, do baldaŭ antaŭ cent jaroj kaj dudek jarojn post Zamenhof.

Cl.- Fakte li ricevis nur elementan instruadon. Sian ampleksan scion li akiris al si kiel aŭtodidakto, vorante librojn, sekvante vesperajn kursojn, korespondante kun verkistoj kaj politikistoj.

A.- Lia patro intencis fari de li terkulturiston. Sed Eŭgeno Adam ne estis homo kapabla enradikiĝi en difinita loko. Li estis migremulo. Tre juna li forlasis la patran hejmon por lerni la lignaĵistan metion.

Cl.- Iom post iom, dank'al sia energio kaj pedagoga talento, li fariĝis instruisto pri lignolaboro, tio antaŭ ol forlasi tiun fakon.

A.- En tiu profesio li kontaktis la laboristan klason, al kiu li restos fidela dum la tuta vivo.

Cl.- La pensado de Lanti havas tri grandajn pensfontojn. Politike li estas markita de la anarkiismo. Sed samtempe la supernaciema penso de Leo Tolstoj, Romain Rolland kaj Voltaire donis al lia anarkiismo apartan koloron. Esperanto kaj ties latentia pensmaniero fine aliigis lin de la ceteraj anarkiistoj kaj definitive liberigis lin de la oficialaj penstabuoj.

A.- En niaj prelegoj pri la kvindekjariĝo de SAT ni plurfoje citis la nomojn de Zamenhof kaj Hodler, ĉar en ili Lanti multon ĉerpis. Li tre atente legis iliajn verkojn kaj artikolojn.

Cl.- Lanti sufiĉe multe verkis en la franca kaj poste pli kaj pli nur en esperanto, ĉefe por laboristaj gazetoj. Ni esperas, ke SAT havos la finanĉan forton povi foje pagi talentan verkiston, kiu provus rikolti tiujn disigitajn artikolojn por ilin publikigi kun historia komentario. Tiam ni tutcerte malkovros en Lanti unu el la plej originalaj laboristaj pensuloj. Tiu verko interesus du publikojn, la esperantan kaj la francan. Pro tio tiu verko devus esti dulingva.

A.- Tiu verko devus komprenigi al la legantaro, kial esperanto tiom influis la pensadon de Lanti, same kiel aliaj verkoj devus tion montri koncerne al Edmond Privat kaj Hector Hodler, por citi du verkistojn, kies vivon ni bone konas.

Cl.- Eŭgeno Lanti estas unu el la unuaj esperantistoj, kiu iom post iom elektis la zamenhofan lingvon kiel personan ĉeflingvon. Pro tio verŝajne li tiel forte sentis la ĉefbezonojn de la esperanto-popolo, inter ili la mankon de plena vortaro, de bona literaturo, de debatemaj revuoj kaj de kulturigaj kongresoj.

A.- Al la kontentigo de ĉiuj tiuj bezonoj li dediĉis siajn fortojn.

Cl.- Li partoprenis la eventojn de la unua mondmilito kiel flegista soldato. Sed jam tiam li estis senigita de patriota iluzio. Notlibro, kiun li verkis dum sia milita deĵoro kaj kiun malkovris lia kamarado Lucien Bannier, lumigas lian tiaman spiritostaton.

A.- Koncerne tiun Notlibron ni legas en la libro *Historio de SAT* :

Cl.- « *En tiu Notlibro, parte inka, parte krajona, jen franclingva, jen esperanta – oni trovas ege kuriozajn rimarkojn pri la milito, la soldatoj, la oficiroj, la pastroj, la civiluloj kaj... la virinoj.* »

A.- Lanti certe havis verkistan talenton. Li skribas singarde, atenteme, neniam supraĵe. En liaj tradukoj kaj en liaj artikoloj ĉiu vorto estas bone lokita, pripensita. Eĉ la stilo de liaj leteroj estas drasta kaj preskaŭ senmakula. Al li la esperanto-stilo multon ŝuldas. Liaj tradukoj el la franca fariĝis modeloj, kiuj daŭre influos la franclingvanojn.

Cl.- Liaj artikoloj, kiuj ne rekte rilatas kun minoraj personaj aŭ movadaj konfliktoj, konservis sian aktualecon, ĉar, kiel ni vidis en pasinta elsendo, Lanti celis la superpartiecon kaj eĉ la supertempecon. Bedaŭrinde, pro manko de nun aĉeteblaj bone komentariitaj artikolaroj, la esperanto-publiko iom post iom perdas la kontakton kun la penso de Lanti, kio povas nur malfavori normale organikan kreskon de la esperanto-movado.

A.- Unu el la karakterizaĵoj de Lanti estis havi la kuraĝon perdi siajn iluziojn kaj tion agnoski publike. Tiu intelekta honesteco vekis kontraŭ li multe da malamo.

Cl.- Li ekzemple vojaĝis al Moskvo en aŭgusto 1922. Pri siaj impresoj en Sovetio oni povis poste legi en *Sennacieca Revuo* :

A.- « *Nenia politika motivo povas trudi al mi la devon silenti pri la malbonaj impresoj, kiujn mi kunportis el Rusio.* »

Cl.- Similajn frazojn neniam pardonos la adeptoj de la rusa komunismo.

A.- En la komenco de sia poresperanta laboro Lanti multon esperis el la subteno de gravaj verkistoj, politikistoj aŭ sciencistoj universale konataj. El tio lia korespondado kaj liaj rilatoj kun Henri Barbusse, Romain Rolland kaj Albert Einstein. Baldaŭ li malkovris la vanecon de similaj esperoj. Tiuj famuloj nur teorie apogis esperanton. Ili ne sufiĉe kredis en ĝi por dediĉi kelkajn horojn al ĝia studado, kion kontraŭe akceptis fari simplaj laboristoj.

Cl.- Tion kompreninte Lanti publike agnoskis sian seniluziigon pri la pasiveco de la kontaktitaj famuloj. De tiam li sin dediĉis al la klerigado de la proletaj esperantistoj.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian historieton de SAT.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-